Heinrich Neye,

# Somer-deziroj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Firme vivas en ni bildo,
kia estu la somer':
taga varmo, nokta mildo,
ege plaĉa la veter'.

Kuŝseĝego kaj sunbrilo,
tendumado kaj banej',
gren-rikolt', arbar-trankvilo,
varmo kaj bier-gastej'.

Daŭre alta aer-premo,
nur nubetoj ce l' ĉiel',
glaciaĵo kaj trinkemo,
ŝvitas ni sub sun-ombrel'.

Akvoskio, ondo-rajdo,
ĉiel-bluo, plaĝ', bikin',
konkoj, sanĝiĝanta tajdo,
sunbrulumo je la fin'.

Firme vivas en ni ĉiuj
tiu bunta mozaik';
Plaĉas ĝi al tiuj, kiuj
vivas en ĉi republik'.

*Traduko de la Germana poemo "Sommerwünsche" de* Heinrich Neye *(∗1913-02-27 – †2002-07-18) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2005-08.25.*

*MR-439-1 / Arg-325-658 (2005-08-26 14:33:21)*

Heinrich Neye,

# Sommerwünsche

Fest gefügt lebt in uns allen
ein bestimmtes Sommerbild:
Wetter voller Wohlgefallen,
Tage heiß und Nächte mild.

Liegestuhl und dunkle Brille,
Freibad, Camping, Hitzefrei,
Erntewagen, Waldesstille,
Gartenwirtschaft nahebei.

Dauerhoch fast ohne Pfütze,
Wölkchen kaum zu sehen sind,
Eislawinen, rote Grütze,
Schweiß, der in den Kragen rinnt.

Wasserski und Wellenreiten,
Himmelsblau, Bikini, Strand,
Muschelbänke und Gezeiten,
Hautschutzöl und Sonnenbrand.

Fest gefügt lebt in uns allen
dieses bunte Mosaik:
Sommer, so kannst du gefallen
in der Bundesrepublik.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Heinrich Neye *(∗1913-02-27 – †2002-07-18).*

*Arg-325-657 (2005-08-26 12:00:28)*